

# LA ETA KATO KIU NE VOLIS MORTI



SAT-Broŝurservo  
1990 - 5 FF

# La eta kato kiu ne volis morti



SinJORino Ŝotar volis mortigi sian katon.

Ĝi estis malsana.



Ši diris al Leo Bjet :

— « Iru al la rivero ; jetu la katon en ĝin ;  
vi faros al mi servon. »



**Leo Bjet iris ĝis la ponto, kaj jetis la katon  
en la akvon ; en lokon, kie ĝi abundas.**


**La kateto malaperis en akvokirlo.**

**Ni diris :**

**« Nun farite !... Ĝi estas senviva ! »**

**Sed la kateto ne volis morti.**

**Ĝi akroĉiĝis al arbustotufo kaj  
eliris  
el la  
akvo.**



**Ĝi sin kaŝis inter la ŝtonoj.**

**Kaj kiam venis la nokto, ĝi revenis al la hejmo  
kaj sin kaŝis en la dometo de la hundo Papilio.**

Papilio diris al ĝi :

« Kiom malseka vi estas !

Ŝajnas, ke vi malvarmas.

Kuŝiĝu tie, kontraŭ mi, por ke mi varmigu vin ! »

La kateto sterniĝis kontraŭ la bona hundo.

Kaj ambaŭ amikoj ekkonversaciis tre mallaŭte  
por ne veki Sinjorinon Ŝotar.





**La kateto diris :**

**« Ĉu vi scias, ke ili volis mortigi min... Se ne estus arbo, mi certe dronus !**

**— Jes, respondis la hundo, infaneto ne kapablus eliri el la akvo, kiel vi mem faris !**

**— Ha ! aldonis la kateto, se vi scius kiom malvarma estas la akvo.**

Kaj tiu bruo en la oreloj...

Huu !...

Huu !

« Ili jetis al mi ŝtonojn por min mortigi. »

— « Ne plu pensu pri tio, diris Papilio.


Dormu ! »





Kaj ĝi eklekis sian amikon ĉe la frunto.

Precize en la loko kie kuŝas la malgajaj pensoj  
de la katetoj.





La sekvantan  
matenon, Sinjorino  
Ŝotar malfermis  
sian pordon.

Ŝi diris :

« Ĝi certe estas tre malproksime, nun ! De tiom  
da tempo, ĝi ruliĝas en la rivero !... »

Sed tute male ! Ĝi estis tre proksime, kaj  
momenton poste, Sinjorino Ŝotar vidis ĝin malantaŭ  
la forno.

Ĝi finsekigis siajn ankoraŭ malsekajn harojn.

Ŝi preskaŭ ektimis.

Ŝi kredis, ke estis kat-fantomo.



**Tiam, ekparolis la kateto por ke ŝi rekonu ĝin.**

**« Miaŭ, miaŭ ! »**

**Tio signifis :**

**« Vidu, mi revenis.**

**Mi ne volis morti !**

**Malvarma estis la akvo, ĉu vi scias ?**

**Ve, mi kredas, ke mi baldaŭ ĉesos vivi.**

**Tiu bano estis sendube kontraŭa al mia malsano.**

**Doloras al mi la tuta korpo !**

Lasu min morti en angulo de la subtegmento ;  
aù sur la teraso, kie mi sentas min bone ; malantaŭ  
la forno, mia ŝatata loko dum vintro.

Lasu min,

lasu min tie ! »



Oni ne povas scii, ĉu Sinjorino Ŝotar komprenis,  
kion diris tiom malgaje la kato, sed ŝi diris :

« Fine, ĝi tudas min !

Ĝi restu tie ! »




**Kaj nun la kateto estas en la domo.**

**Ĝi laŭpove trenas sin.**

**Evidentiĝas, ke ĝi estas tre malsana.**

**Kiu scias la malgajajn pensojn, kiuj ruliĝas en  
ĝia kata kapo.**

**Ĝi diras ilin al neniu.**



**Eĉ ne al sia amiko Papilio.**

**Sed,**

**iun matenon,**

**SinJORINO Ŝotar, post ellitiĝo, trovos la kateton  
malantaŭ la forno, sternantan kun la piedoj rigidaj,  
kaj la okuloj senmovaj...**





**Kaj tiam,**

**denove,**

**oni jetos ĝin en la riveron.**

**Kaj ĉifoje, tute vere, ĝi faros longan vojaĝon.**



**Ho ! Jes,**

**tre longan**

**vojaĝon !**



Verkis la lernantoj (5-jaraj) de la  
infanklaso de Prelles, kunlabore  
kun sia instruistino M.-L. Lagier-Bruno.

*(Tradukita de Lentaigne.)*

Verkis tiun ĉi broŝuron la Infanlernejo de Prelles (Hautes-Alpes, Francio) kaj la unuan eldonon presis ICEM (Esperanto-Fako de Moderna Lernejo "Freinet") antaŭ pluraj jardekoj.

Reeldonas Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F-47470 BEAUVILLE en la kadro de SAT-Broŝurservo.